# TEA-BULTENO

1ª JARO | SEPTEMBRO 1998 | NUMERO 7

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| 1 | M | Reek' al labor': ordigo de la arkivo |
| 2 | M | |
| 3 | Ĵ | |
| 4 | V | Raporto pri la Itala Kongreso en Frascati |
| 5 | S | |
| **6** | **D** | |
| 7 | L | |
| 8 | M | Ordigo de la arkivo |
| 9 | M | |
| 10 | Ĵ | |
| 11 | V | Sen-tema babilado |
| 12 | S | **Esperanto en Mantuo** (vd. dorspaĝe) |
| **13** | **D** | **Festo de Amikeco - Dreiländerecke** |
| 14 | L | |
| 15 | M | Ordigo de la arkivo |
| 16 | M | |
| 17 | Ĵ | |
| 18 | V | Impresoj pri OSIEK-Konferenco |
| 19 | S | |
| **20** | **D** | |
| 21 | L | |
| 22 | M | Parolas la unuafojaj kongresanoj |
| 23 | M | |
| 24 | Ĵ | |
| 25 | V | Pri la 83ª UK en Montepellier |
| 26 | S | |
| **27** | **D** | |
| 28 | L | |
| 29 | M | Ordigo de la arkivo |
| 30 | M | |

## Vortoj de la redakcio

Kara Leganto!

Jen denove en viaj manoj via asocia bulteno! En aŭgusto ĝi tute ne aperis: ni ja paŭzis post la laboroj por Internacia Esperanto-Konferenco '98 kaj antaŭprepare al UK, kaj ankaŭ pro la terura varmo kiu sufoke senfortigis nin. Eble vi eĉ ne rimarkis ĝian ne-aperon, pro troa okupiteco, ĉefe rilata al pretigo de valizoj por alvojaĝi al diversaj Esperanto-renkontiĝoj. Kie vi esperantumis? Ĉu vi freneze amuziĝis? Kiom da novaj amikoj vi akiris? Kiom da belaj panoramoj vi ĝuis?


Rekorda estis ĉi-jare la partopreno de TEA-anoj en la Universala Kongreso: entute 14! Ni povas esti fieraj pro tio! Kaj nun, tre scivoleme, oni atendas aŭdi la impresojn precipe flanke de la unuafojaj kongresanoj.

Sed ni iomete retrorigardu al la laste organizita aranĝo de nia asocio, nome al OSIEK-Konferenco. Fakte pri tiu evento mankis tempo por kune priparoli, por diskuti pri ĝia disvolviĝado, por kritiki la mankojn, la fuŝojn kaj por kune serĉi novajn vojojn al plibonigado de nia estonta agmaniero. Laŭ diroj kaj laŭ subaŭskultadoj ĉio iris bone: la kutima etoso, agrabla, amikiĝema kaj entuziasma, kiu akompanadas tiujn konferencojn, plej sukcesigis la triestan rendevuon. Dum IEK '98 estis atribuita la OSIEK-Premio al **Claude Piron** por la libro LA BONA LINGVO kaj krome estis elektita la urbo kiu gastigos la venontjaran IEK-on: **Metz**, Francio (17-23 julio 1999). Tie oni priparolos la jenan temon: MONO KAJ CIVILIZO.

Do, fine oni povas aserti ke la organiza teamo estis kontenta pri la rezultoj kaj kio plej ĝojigis ĝin, estis la fakto, ke, por la lastmonataj preparoj kaj dum la konferenca semajno, prezentiĝis tuta «skipo» da vigla, iniciatema kaj ege agema helpantaro (plejaltprocente konsistanta el virinoj!) kiu per sia konstanta kunlaboro valore kontribuis al la glata funkciado de la aranĝo. Korajn dankojn al ĉiuj!

Nun, post la somera libertempo, ni revenas al la rutina asocia agado. Oni ne promesas al vi fantastajn amuziĝojn aŭ spektakloriĉajn prezentaĵojn, sed simplajn programerojn, kiajn vi povas vidi en la ĉi-apuda agendo, sed memoru ke por nia asocio tre gravas via konstanta ĉeesto, ĉar ideoj kaj proponoj por ontaj programoj naskiĝas nur kiam oni daŭre interrilatas unu kun la alia, kiam oni mergiĝas en la funkciado de la asocio, kiam oni pli profunde konas la aliulon.

Helpu la estraron en sia engaĝiĝo cele al disvastigo de la internacia lingvo en nia ĉirkaŭaĵo, ĉar ja vi mem spertis kiom riĉiga, kulture, socie kaj homece, Esperanto estas, kaj do, ĝi certe meritas iom da via tempo: ĉu ne?




## 83a Universala Kongreso de Esperanto en Montpeliero

Ĉu eblas doni objektivan komenton pri la granda Esperanto-evento kia estis la 83a Montepliera UK? Miaopinie tute ne. Je la reveno oni ja flankemetas tiujn eventualajn negativajn spertojn por rememori nur la pozitivajn. Sed, sincere dirite kaj - esperebIe - senpartie, grandioze kaj tutprofesie organizis la ĉijaran UK-n la franca skipo, gvidate de s-ino Claude Nourmont. Kio plej impresis min estis la invado de la neesperantista tereno, nome la plena malfermiĝo al ekstera publiko en kaj ekster la kongresejo: tra la urbo lum-reklamiloj, afiŝoj, varbiloj ĉie dismetitaj, surplacaj koncertoj, prelegoj, teatraĵoj kaj konstanta ekspozicio en la urbodomo, eĉ buntaj, priesperantaj, balonetoj en infanaj manetoj; en nia kunvenejo, ĉeesto ĉiutaga de televiziaj kaj ĵurnalaj raportistoj. El tio rezultis ke esperantistaro estis videbla, ne fermita en sia ŝelo, tiom ke eĉ surplacaj robovendistinoj - tre ruze - lernis kelkajn esperantajn vortojn, por allogi esperantistajn aĉetantojn. Do, la lokanoj estis bone informitaj, ke ni ekzistas, sed ne nur, eĉ malproksime de Montpeliero oni atentis pri nia interparolo kaj petis informojn pri *Espéranto*. Kaj ĉio ĉi signifas, ke la laboro de tiu kompetenta teamo efikis.

Nun kelkaj sciigoj pri la Kongreso prenitaj el la **KoKo**, la Kongresa Kuriero:

Ne mankis dum la inaŭguro la legado de salutvortoj senditaj de eminentuloj, inter kiuj la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj *Koffi Annan*, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, la Prezidanto de la Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj, la Federacia Kanceliero de Aŭstrio *Viktor Klima*, la Ĝenerala Sekretario de Internacia Organizaĵo de Franclingvio, eksa Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj *Boutros Boutros-Ghali*, el kies mesaĝo citindas: *...En momento kiam tutmondiĝas la komerco, kiam konturiĝas la minaco de lingva monotoniĝo kaj malapero de kulturaj valoroj, ni ja devas mobilizi nin por ke la monda komunumo ne estigu tutmondan kulturon kun unueciĝo de la modeloj, la kondutmanieroj kaj la pensoj. Temas pri la demokratigo, je monda nivelo, de la rilatoj inter la popoloj!...*

Dum la malferma ceremonio, Michela Lipari prezentis la ses novajn honorajn membrojn de UEA: André Albault kaj Pierre Babin (FR), Ignat Bociort (RU), Claude Piron (CH), William R. Harmon (US) kaj Sabura Yamazoe (JP). Dum sia parolado, Lee Chong-Yeong aludis pri la 90 jaroj de UEA kaj pri la 100-jariĝo de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj emfazis la plej gravajn laborplanojn de nia tegmenta asocio:

⇒ Kampanjo 2000 aprobita dum la pasintjara UK
⇒ Fortigo de rilatoj inter UEA kaj Unuiĝintaj Nacioj
⇒ Linguapax
⇒ Kiel savi valorajn esperantaĵojn
⇒ Forumo de Esperanto-Komunumo.

## Elektoj: la Nova Estraro de Uea

| | |
|---|---|
| Kep **Enderby** (AU) | Prezidanto, Kunordigo, Eksteraj Rilatoj |
| Renato **Corsetti** (IT) | Vicprezidanto, Kampanjo 2000, Landa Agado, Financoj |
| Michela **Lipari** (IT) | Ĝenerala Sekretario, Junularo |
| Petr **Chrdle** (CZ) | Fak- kaj Scienc-Agado, Instruado |
| Kalle **Kniivilä** (SE) | Informado |
| Gbelo **Koffi** (TG) | Afrika Agado, Kulturo |

**Filatela Angulo**

La 7an de aŭgusto ĉiuj korespondaĵoj ricevis la kongresan stampon. En cirklo, franca teksto: *83e CONGRES MONDIAL d'ESPERANTO 1er au 8 Août 1998 - 7 Août 1998 - 34 MONTPELLIER* ĉirkaŭas leviĝantan sunon sur akvodukta arkaro kaj novklasikstilan konstruaĵon, sub kiu vinberaro: tiel bildkoncize prezentiĝis la urbo!

Kiom da UK-aliĝintoj? **3133** geamikoj el **63** landoj!
**Prelegoj**: okazis paroladoj pri plej diversaj temoj. La oficiala *Mediteraneo - ponto inter kulturoj* permesis esplori vastajn terenojn, kun fina intenco progresigi la kunlaborajn interrilatojn de landaj asocioj ĉirkaŭmediteraneaj. Estis krome ebleco pli bone konatiĝi kun la historio kaj kulturo de la franca regiono nin gastiginta. Ĉiutage fakaj, religiaj, hobiaj kunvenoj kaj renkontiĝoj: plenŝtopiĝis ankaŭ ĉijare la ĉambro kie kolektiĝis la Kat-rondanoj, prezide de Marjorie Boulton; gimnastikis frumatene viglemuloj kaj poste Yumeiho-terapiistoj reordigis al ili la artikojn, dum ĉiumatene deĵoris senpage 2 kuracistoj laŭ tradicia kaj natura kuracmetodoj.
Domaĝe! mankas spaco! Tial, por ekscii aliajn detalojn pri la UK, venu al nia asocio.

---

## Dimanĉon la 13an de septembro
## Festo de Amikeco ĉe Dreiländerecke

Ne forgesu nian tradician renkontiĝon montpinte apud Arnoldstein! Kiel kutime ni atingos la festejon laŭ du vojoj: sportemuloj, piedire de la italia flanko, malsportemuloj, telfere de la aŭstria parto. Surmetu la Alp-Adrian T-ĉemizon! Detaloj ĉe TEA-sekretario.

**Esperantista franca paro** restados en Triesto de la 13a ĝis la 18a de septembro. Informiĝu ĉe TEA-sekretario, kiam ili vizitos nian grupon, por multnombre kaj gasteme akcepti ilin.

## LiteraturFestivalo en Mantuo

Esperanta PEN-Centro kaj Mantua Esperanto-Grupo invitas vin, la 12an kaj 13an de septembro 1998, partopreni en tiu ĉi grava rendevuo. Prelegos:
William AULD - La sperto de la Lingva Komitato 1905-48
Carlo MINNAJA - La konflikto ata-ita
Ilona KOUTNY - La kategorieco de la radikoj
Pliaj informoj ĉe TEA-sekretario.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349